

REZOLUCIO

Okaze de la 60-jariĝo de la Unua UNESKO-Rezolucio favora al Esperanto okazinta en Montevideo, UY la **47a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI**, samurbe, la 24an de Julio 2014, decidis kaj konigas :

Konsiderinte la duan Rezolucion de UNESKO en 1985 en Sofio, BG, kiu emfazas la atingojn de Esperanto,

Konsiderinte, ke Esperanto aperas sur le retejo de UNESKO apud la ses laborlingvoj de UNESKO kaj la bulgara por prezenti la paroladon de la Ĝenerala Direktorino Sinjorino Irina Bokova por la Tago de la Patrino Lingvo je la 21a de Februaro 2014,

Konsiderante la paralelecon de la celoj de Esperanto kaj UNESKO kaj la similecon de la alstrebataj valoroj kiel respekto, solidareco, toleremo,

La konferencanoj rekomendas al UNESKO

- noti la gravecon de la egalrajtiga, diskriminaci-malhela rolo de la Esperanto-instruado por pacedukado, en kiu la instruistoj praktikas ankaŭ utiligon de esperantlingva porpaca literaturo (la serio Oriento-Okcidento atingis kvindek da titoloj ne nur el Eŭropo kaj Azio sed ankaŭ el Afriko kaj Sud-Ameriko), konsciigon pri diferencaj popolsintenoj, kulminaj en konfliktsituacioj ; ili praktikas konfliktsolvadon, sed ankaŭ la utiligon de verkoj rilataj al UNESKO mem kaj la Homaj Rajtoj kiel la « Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj », « Paĉjo, kio estas rasismo ? » « Kio estas demokratio ? » kaj multaj aliaj.
- plu subteni tiun agadon de Esperanto-instruantoj.

ILEI volas

Rekomendi al siaj sekcioj esplori pri la konsisto de sia nacia UNESKO Komisiono kaj ekrilati kun ĝi ;

Provi prezenti Esperanton al tiu instanco kaj krei daŭripovajn ligojn kun ĝi ekzemple per aliĝo ;

Rekomendi al siaj sekcioj konigi al siaj membroj la laboron de UNESKO kaj ties celojn kaj valorojn ;

Rekomendi al siaj sekcioj partopreni en la agadoj de UNESKO laŭ siaj ebloj kaj laŭ la lokaj cirkonstancoj ekzemple per kunlaboro por atingi la jarmilajn celojn de Unuiĝintaj Nacioj ;

Ek rilati kun la ĉefa sidejo de UNESKO en Parizo cele al depono de kandidatiĝdosiero por fariĝi Ne Registara Organizo de tiu stablo ;

Partopreni plej multe da laborkunsidoj en Parizo kaj eventuale en aliaj lokoj en la mondo sendante reprezentantojn laŭ la ebloj ;

Sendi al UNESKO agadraportojn kaj atestojn pri samcelaj aktivecoj

Sendi al UNESKO regule la du revuojn de ILEI : *Internacia Pedagogia Revuo* kaj *Juna Amiko*

Peti aŭspiciojn de la nacia UNESKO Komisiono por la Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto en Svislando kaj por ĉiuj ĉiujaraj Konferencoj kaj inviti tiun instancon al la malferma ceremonio de tiuj okazaĵoj.

Utligi en ĉiunivelaj kursoj materialojn pacedukajn, kulturdiskonigajn kaj sciencpopularigajn. Kunlabore kun interalie UEA vastigi la konojn pri la tuta mondo per verkoj en Esperanto, interalie per la serio Oriento-Okcidento nome per individuaj aŭ grupaj retradukoj aŭ almenaŭ resumoj de elstaraj eldonaĵoj rekomendataj de UNESKO.

